


SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

<http://satesperanto.free.fr/> *** retadreso: satesperanto@free.fr



BEOGRADO JAM
GASTIGIS NIN
ANTAŬ 50 JAROJ !

Junio 2006 77-a jaro, n-ro 6 (1212)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €




SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

SIGMUND FREUD

NASKIĜIS ANTAŬ 150 JAROJ

Antaŭ 150 jaroj, la 6-an de majo 1856 unua fojo alfrontis la naskiĝis Sigmund Freud, kiu poste iĝis malaprobon de siaj tezoj.



Sigmund Freud

“patro de la psikanalizo” malkovrante subkonscion kaj la gravecon de la infana sekseco en la kuracado de neŭrozoj.

Sigmund Freud iĝis elĵetulo en sia propra patrio, Aŭstrio. La kialon de tiu ĉi forĵeto oni povas serĉi unuflanke en lia juda deveno kaj aliflanke en la strangeco de liaj teorioj.

“Antisemitismo estis tre granda en la aŭstro-hungara monarĥio fine de la 19-a jarcento kaj komence de la dudeka, ĉefe en Vieno, kie Freud, nepraktikanta judo, vivis ĝis la aĝo de 78 jaroj.

Por Christine Diercks, prezidantino de la “Psikanaliza societo de Vieno”, fondita de Freud en 1908, “certe la antisemitismo en Vieno tiam estis tre granda, sed Freud estis akceptita dumaniere: La psikanalizo, kiu provokis timon, estis forĵetata kaj kritikata, sed samtempe ĝi fascinis”, ŝi pensas.

DETRUITAJ TABUOJ

Freud venis kun novaj ideoj kiuj detruis tabuojn”, diras sino Diercks, aldonante “en la mondo kun la viktoria moralo, oni nepre devis atendi negativajn reagojn”.

“Krom la antisemitismo, la malamikecon kontraŭ Freud oni povas klarigi per tiuepoka konformista kaj burĝa societo, ĉar psikanalizo publikigis ĝian bigotecon”, klarigas Dr. Friedmann.

Post iu restado en Parizo, kie li laboris en 1885 kun franca neŭrologo Jean-Martin Charcot, la “Napoleono de neŭrozoj”, Freud, revenas al Vieno kie li por la


unua fojo alfrontis la malaprobon de siaj tezoj.

REVOLUCIAJ TEZOJ

En la epoko kiam la histerio estas ekskluzive atribuita al virinoj, Freud prezentas en oktobro 1886 antaŭ Kuracista societo, iun tezon, en kiu li asertas ke ankaŭ viroj povas havi psikajn perturbojn.

La skandalo estas completa.

Juna kuracisto, instalita en aĝo de 30 jaroj kiel praktikanto en la ĉefurbo de Aŭstro-hungara imperio, estas




forĵetita de siaj kolegoj kaj de tiutempa viena societo. En 1890, li publikigis “La interpreto de revoj” en kiu li kreas sian psikanalizan teorion kiun li plilongigas en la dudekaj jaroj per sia teorio de “tio”, de “mi” kaj de “sur-mi”.

EKZILO EN BRITIO

Maltrankviligita de nazioj, li ekziliĝas al Londono en 1938 post la aneksado de Aŭstrio far Hitlera Germanio. Li mortas venontan jaron en la brita ĉefurbo. “Freud detruis la grandan tabuon de la Eklezio”, klarigas ankoraŭ Dr. Friedmann. “En la

katolika lando kiu konsideris infanojn senseksaj, li donis al ili seksecon en kiu li vidis originon de plenkreskulaj neŭrozoj”.

Flategata en Okcidento, ĉefe post la traduko de liaj verkoj en anglan, Freud



Sigmund Freud en la jaro 1938

estis akceptita en Aŭstrio nur post la Dua mondmilito. Eĉ hodiaŭ Freud ne estas aplaŭdata ĉie kaj la psikanalizo provokas koleron. Tio okazas ĉefe ĉar la homoj ŝatas ion simplan kaj la psikanalizo ne estas simpla kaj ne faras miraklojn. .

Nur en 1971 Aŭstrio malfermis por li muzeon en la apartamento de la Berggasse kiel li havis sian kabineton dum 30 jaroj. En la aŭstria universitatoj psikanalizo daŭre ne estas devige instruata en la programoj de psikologio kaj neniu strato havas nomon de tiu subkonsciencesploranto.

Kompilis: K.B.

En Esperanto estas akirebla:

Sigmund Freud

**KOMPENDIO DE
PSIKANALIZO**

elgermanigita de
Dr. G. Patureaux

Eldonita de KAVA-PECH

ISBN 8085853620

Mendebla ĉe grandaj libroservoj

Karaj,
ni estas jam en junio,
do mezo de la jaro, kaj
pluraj el vi ankoraŭ ne
pagis sian kotizon. En
julio ni devos ĉesi la
ekspedon de Sennaciulo
al nepagintoj kaj tio es-
tas tre malagrabla por



la SAT-sidejo. Pro tio ni petas vin, faru
vian membrodevon, ĉar SAT bezonas tiun
monon por povi normale funkcii.

En tiu ĉi numero vi trovas la jarraporton
de la Plenum-Komitato de SAT. Legu ĝin
atente por pli bone kompreni la situacion
de la Asocio. Pri tio ni diskutos dum la
kongreso en Beogrado. Nepre kunportu
tiun ĉi numeron al Beogrado.

Restas ankoraŭ iom malpli ol du monatoj
antaŭ nia kongreso kaj tiuj gekamaradoj
kiuj ankoraŭ ne decidiĝis povas ankoraŭ
aliĝi. Ĉu vere la U.K. en Florenco pli in-
teresas SAT-anojn ol la SAT-Kongreso?
Ja, ni scias ke pluraj el vi iros al UK kaj
ne al Beogrado. Tamen, en Florenco vi
decidos pri nenio, dum en Beogrado vi
decidos pri la estonto de via Asocio. Do,
via partopreno estas nepre necesa. SAT-
anoj decidu pri SAT.

Kamaradece al ĉiuj, via

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj re-
daktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020
Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiiilo:
+33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesperanto@free.fr.

TTT-paĝoj: <http://satesperanto.free.fr>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de
mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la labor-
horoj funkcias aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: **satx-s**

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin,
Viola, C. Orsingher, Snajpero, I. Močilnik kaj K.
Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro: Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redakto.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj
mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas. La
limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de
kuranta monato.



Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot,
FR-75017 Paris.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BAN-
NIER

Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia
peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

N° CPPAP 0510 G 86567

Limdato por ricevo de kontribuoj estas ĉiam la
10-a en la monato.



PACO

Ĉiam la Sekvo de Zagreba Kongreso

INTERVENO ĈE LA PARLAMENTA ASEMBLEO DE LA KONSILIO DE EŬROPO

Rememorigo :

Tiel estas redaktitaj du el la paragrafoj de la Deklaracio de la Kongreso en Zagreb.

« La 78-a Kongreso de SAT

... .. »

Ree postulas ke la landoj, kiuj ne ankoraŭ subskribis la Konvencion de Otavo, pri la « malpermeso de la uzado, produktado kaj stokado de kontraŭpersonaj minoj kaj pri la detruo de kontraŭpersonaj minoj », nepre subskribu kaj apliku ĝin.

Postulas inkluzivi en la kampon de apliko de la Konvencio de Otavo ĉiujn armilojn kiuj eksplodas, samkiel kontraŭpersonaj minoj, t.e. pro la ĉeesto, proksimeco aŭ kontakto de eĉ nur unu homo.

... .. »

Dum la Zagreba Kongreso, ni disdonis flugfolion, kiu diras :
la franca deputito François ROCHEBLOINE (Francisko
Roŝbluan) promesis ke li prezentus ĉe la Asembleo de la
Konsilio de Eŭropo la du paragrafojn ĉi-supre se nia Kongreso
voĉdonus ilin.

Faktoj :

Post la kolokvo en Parizo la 6-an de oktobro 2005 pri la
malpermeso de uzo kaj fabrikado de pafaĵojetoj el bomboj (vidi
decembran Sennaciulon 2005), la franca deputito metis, dum
la aprila sesio de la Asembleo de la Konsilio de Eŭropo, la du
Proponojn de Rezolucio ĉi-sube ĉe la Asembleo.

Unua Propono de Rezolucio :

Ratifo de ĉiuj Ŝtatoj, membroj de la Konsilio de Eŭropo, de la Konvencio de Otavo

pri la malpermeso de la uzo, de la stokado, de la produktado kaj de la transporto de kontraŭpersonaj minoj.

.1- Ĉiu arma konflikto kaŭzas multajn detruojn kaj multajn viktimojn inter la civila
popolacio, kaj la minoj daŭrigas ĉiujare mortigi aŭ kripligi 15 000 ĝis 20 000 personojn en
la Mondo, longe post la fino de milito. 100 milionoj da minoj estus ankoraŭ enfositaj en
sesdeko da landoj. Tio estas plago, kiu blinde trafas kaj precipe la infanojn.

.2- Ekde 1997, la Ŝtatoj, kiuj subskribis la Konvencion de Otavo, devigu sin ne uzi, ne
produkti, ne aĉeti, ne stoki, ne transporti kontraŭpersonajn minojn, sed ankaŭ devigu sin
detruu sian stokon, kaj helpi la senminigon en la Mondo.

.3- La unuan de januaro 2006, 149 Ŝtatoj ratifis tiun Konvencion. Tamen grandaj Ŝtatoj :
kiel Usono, Rusio, Ĉinio bedaŭrinde ne ankoraŭ subskribis ĝin.

.4- En la Konsilio de Eŭropo, 6 membroj ne ankoraŭ ratifis la Konvencion. Estas la devo
de la Konsilio de Eŭropo, kiu agas por la Paco kaj la Homaj Rajtoj montri la ekzemplon.
Tial la Parlamenta Asembleo devus subteni tiujn ses Membroŝtatojn por ke ili entreprenu
la demarŝojn por apliki la Konvencion.



*François Rochebloine
deputito batalanta por
la paco*